Aŭstraliaj Esperantistoj

Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale
PLENUMITA 02/07/2020 Kvarcentokdekkvina eldono (unua eldono 20/09/2011)

Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo*
Google Translate *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo*
Esperanta Retradio *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

★★★

★★★

Markus Gabor (Hungario): KOVIM-19 en Hungario

Pli da detaloj en nia retejo

(3) KIU ESTAS KIU?

La libro “Kiu estas Kiu” de Katja Steele kaj Charles Stevenson estas preskaŭ preta.

Katja ŝatas aldoni fotojn de ĉiuj Aŭstralia kongreso aŭ somerkursaro.

La libro de Katja kaj Charles “Kiu estas Kiu” bone progresas. Katja ŝatus lanĉi ĝin venontjare.

(4) MEMORIGO PRI LA NUNAJ VIRTUALAJ KUNVENOJ

La listo de nunaj Esperanto virtualaj kunvenoj en Aŭstralio.

Brisbano: Ĉiun duan sabaton, je la 14:00-a **(kontaktu:** maquinacionescreativas@gmail.com**)**
Sidenejo: Sabate, 18:00 -20:00
Melburno: Dimanĉe, 19:00 – 19:40 (MeetUp)
Adelajdo: Dimanĉe, je 14:00 (Meet Up), (14:30 en Sidnejo, Melburno)
Ĉiun unuan merkredon de la monato, je la 19:00-a (19:30 Sidnejo)

Bv partopreni kaj kontribui.

Se vi scias aŭ eble eĉ mem organizas virtualajn kunvenojn informu nin.

Venonta kunveno: jaŭdo 9-a de julio 2020.

★★★

Pli da informoj: aea.esperanto.org.au/eo/prelegserio-zoom-2020 *Jonathan Cooper*

★★★

mi decidis eldoni tiun gazeton kun la helpo de tri aliaj membroj de la nederlanda marksisma kontraŭbolŝevisma grupo de Internaciaj Komunistoj aŭ “Konsilantarkomunistoj”, kiuj estis internacie malgranda movado. Malgranda, ĉar ili ne rajtis ekzisti en la hitlera Germanujo nek en la lenina Rusujo nek en la musolinia Italujo nek en la franka Hispanujo nek en la “demokrata” Usono. En mia urbo Amsterdamo mi trovis tri membrojn, volantajn lerni Esperanton por tio, i.a. Bruun van Albada, kiu perfekte lernis la lingvon en unu nokto, ĉar li havis en Nederlando la plej altan inteligento-kvoton. La du aliaj rapide lernis, por povi helpi min baldaŭ. Dudek paĝoj da intensaj kaj ne refuteblaj fundaj artikoloj pri la marksismo ja estas multe por ĉiu monato. Ni baldaŭ ricevis samopiniajn amikojn en Parizo. Do tiujn gazetojn mi propagandis kaj vendis en la kongresoj, sufiĉe multnombre. Ankaŭ tutmonde konataj Esperantistoj simpatiis kun ni. Vojaĝi tra Germanujo estis permesita, sed ne bicikle, nur aŭtobuse aŭ vagonare, same kiel tuj post la milito en la de Britujo okupita parto de Germanujo.

Kvankam en la kvar jaroj antaŭ la milito mia plej grava laboro estis la eldonado de la gazeto “Klasbatalo” kaj ĝia disvastigado en la kongresoj, kelkfoje du en la jaro, mi ege aktivis en la mallongtempa, du jarojn, splitiĝo en du de la nederlanda laborista Esperanto-Asocio. Mi ne priskribos ĝin nun, ĉar ĵusan jaron mi faris tion en A.E. Dum preskaŭ du jaroj da interbatalo inter la du partioj, mi organizis kaj propagandis la starigon de ekstra laborista Esperantoorganizo en Nederlando, pli kunlabora kun S.A.T. Krome, en la fino de 1936, mi ricevis labordungiĝon en malgranda banko, rilatanta al grupo de germanaj bankoj. Tiun oficon, kvankam malaltan, mi ricevis de unu el la direktoroj de la banko. En tiu tempo ekzistis organizo de riĉuloj kiuj, per donacado de ekstraj nutraĵoj, helpis senlaborulojn kiuj klare estis politike dekstraj, konservativaj. La edzino de tiu bankdirektoro iomete pentradis, volante esti artistino. Por helpi en la organizo ŝi elektis verajn artistojn. Tiel ŝi vizitis dufoje en la monato miajn gepatrojn kun granda sako da normalaj manĝaĵoj ofte tro multekostaj por senlaboruloj. Miaj gepatroj igis ilin legi la leterojn kiujn mi regule sendis por rakonti miajn travivaĵojn dum mia kvinmonata biciklado tra Francujo. La geriĉuloj trovis min tial tiom brava kaj entreprena, ke li konkludis ke mi estus bona dungito en sia banko. Mi tute ne ŝatis la laboron en banko, kaj kiam mi ne havis ion farendan dum mia laboro, mi senkaŝe legis libron, nome “La Kapitalo” de Karlo Marks. Malgraŭe unu subdirektoro savis min ĵetati en malliberulejon por kelkaj jaroj pro pli frue senrajte fuĝinti el la nederlanda armeo. Li tie havis altan rangon. Tamen la armeo decidis ke mi devis reaniĝi al la armeo (por fari tie mian unukajduonjaran militan servon), sed mi tuj deklaris min malsana, per la skriba atesto de antaŭa kuracisto, kaj post unu monato tie oni maldungis min el la armeo por ĉiam (“pro korpaj difektoj”). Mi do povis redungati de la banko.

Tuj kiam la milito eksplodis, en Ĉeĥoslovakujo, internacia vojaĝado en Eŭropo ne plu eblis: Mi kaj mia fratino estis en la sudo de Francujo (por viziti mian fianĉinon) kaj trafis la lastan vagonaron el de Parizo al Amsterdamo. La nombro de la al Nederlando hejmvojaĝantoj estis tiom granda, ke dum la tuta vojaĝo ni devis stari en brutvagonoj pakite kiel sardinoj en skatoleto. Sed ni bonŝancis, ĉar se ni ne trafus tiun lastan vagonaron, ni devus dum la milito resti en Francujo, kiu okupatis de Hitler antaŭ ol Nederlando.

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Dum la okupado de Nederlando ate de la hitlera Germanujo la laboristaj kluboj kaj asocioj ne rajtis ekzisti, sed jes la neŭtralaj Esperantistoj, dum kelkaj jaroj. Ĉi lastaj okazigis sufiĉe grandan kunvenon por subteni iun sinjoron Manders kiu volis peti la Akademion de Esperanto nuligi la Fundament'an regulon ke la rekta objekto devas esti en la akuzativo (kun la finaĵo "-n"). La Akademio kompreneble ne akceptis tiun peton, sed post la milito ĝi akceptis tiun sinjoron Manders kiel membron. Post la unua jaro de la milito en Nederlando la germanaj okupantoj deklaris ke ĉiuj viroj nederlandaj devis iri al Germanujo por tie labori en la fabrikoj. El de tiu jaro ĝis la fino de la milito mi do devis kaŝi min. Biciklante en la stratoj mi riskis kaptati de tiucelaj policanoj. Mi tamen faris de tempo al tempo. Kelkfoje la milita polico senaverte okupis blokon de domoj kaj serĉis en ĉiuj domoj judojn kaj komunistojn kaj junajn virojn kaj virinojn. Ofte la "subteruloj" avertis nin, sed ne ĉiam povis. Oni do devis kaŝi sin sub la planko aŭ malantaŭ muroj. Mi estis bonŝanca ĉar malantaŭ nia domo kaj nia ĝardeno estis la neuzata granda domo apartenanta al la germana urbestro de Amsterdamo, kaj mi havis ŝlosilon por eniri ĉar mi kaj la aliaj najbaroj devis laŭvice protekti la domon; la germana polico ne rajtis eniri en tiun domon. Ĉar mi ne plu povis vojaĝi, mi devis forlasi la bankon. Sed miaj gepatroj plu ricevis senlaborulan pagon, kaj cetere mono ne helpis aĉeti nutraĵon ĉar la butikoj vendis nur vian kvanton. Por havi pli da manĝaĵoj miaj maljunaj gepatroj devis bicikli al la farmistoj por el de ili aĉeti ekstrajn terpomojn aŭ tritikon. Nur la malgrandaj farmistoj helpis la ordinaran popolon, sed la riĉegaj farmistoj vendis nur kontraŭ oro aŭ valoraj objektoj, kion ni ne havis.

Ni ricevadis, sekrete, la novaĵojn pri la milito el de la britaj radiostacioj, sed ili silentis pri Esperanto.

Marcel Leereveld.

★★★

Mi komencis lerni Esperanton en la jaro 2014, kiam nia instruistino kiu nomiĝas Heidi Goes el Belgio, venis en nian landon dum unu monato, ŝi instruis al ni Esperanton. Mi lernis dum unu monato, mi komprenas kaj babilas kun amikoj en fejsbuko.

En la jaro 2015, mi partoprenis en la kongreso de SES en Martin, Slovakio, IJK en Wiesbaden, Germanio, kaj 100a UK en Lillo, Francio.

En Francio mi renkontis la Prezidanton de Esperanto Asocio en Aŭstralio S-ro Sandor kaj lian edzinon Helen, ni babilis iomete pri la Esperanto-movado en Orienta Timoro.

Mi tre ĝojis kiam la Aŭstralia Esperanto-Asocio invitis miajn amikojn en Orienta Timoro por partopreni en la trilanda Kongreso de Esperanto en Bandung Indonezio antaŭ kelkaj jaroj. Mi esperas ke Aŭstralio povus helpi nin por disvantigi Esperanton en nia lando.

Koran Dankon *Cornelio*

★★★